

Prof. Dro Ivo Lapenna: SEPDEK JAROJ DE LA INTERNACIA LINGVO

En julio 1887 aperis en Varsovio la unua lernolibro de la Internacia Lingvo por Rusoj. La 40-paĝa libreto konsistis el Antaŭparolo kun kelkaj tekstoj en la nova lingvo kaj el plena gramatiko kun nur 16 reguloj. Sur aparte amonita folio troviĝis vortaro Internacia-Rusa kun klarigoj pri ĝia uzo. La aŭtoro estis Dro L. L. Zamenhof, sed li eldonis la verkon sub pseŭdonimo D-ro Esperanto, laŭ kiu la lingvo estis poste ofte nomata.

En nuraj 70 jaroj, spitante multajn obstaklojn – antaŭjuĝojn, diverspecajn rasismojn kaj ŝovinismojn, militojn, misprezentojn, rektajn malpermesojn – la Internacia Lingvo traboris al si la vojon en ĉiujn partojn de la mondo, penetris en ĉiujn sociajn tavolojn. Ĝis la fino de 1956 estis entute publikigitaj ĉ. 2000 diversaj lernolibroj de Esperanto por pli ol 50 naciaj lingvoj. Esperanto-organizaĵoj nun funkcias en ĉiuj partoj de la mondo. Daŭre kreskas la nombro de diversaj sciencaj, fakaj aŭ specialigitaj internaciaj organizaĵoj, kiuj utiligas Esperanton kiel la solan lingvon por siaj internaciaj rilatoj. Nur en 1956 pli ol 10 000 personoj uzis Esperanton dum internaciaj kongresoj, konferencoj kaj kunvenoj. La literaturo en Esperanto konsistas el tradukitaj kaj originalaj romanoj, noveloj, dramoj, poemoj, sciencaj verkoj, disertacioj, studoj. La ĉefaj verkoj de la monda literaturo, veraj juveloj literaturaj de malpli grandaj nacioj kaj valoraj verkoj, skribitaj originalo en Esperanto, donas al la lingvo grandan kulturalan valoun. La biblioteko de la Brita Esperantista Asocio en Londono havas pli ol 30 000 registritajn erojn de publikaĵoj en Esperanto. Ĉ. 100 revuoj kaj gazetoj – ĝeneralaj, literaturaj, sciencaj, fakaj aŭ religiaj – nun regule aperas en tiu lingvo. Trideko da radio-stacioj nuntempe elsendas en Esperanto. Estas menciinde, ke ĉiam pli granda nombro da nacilingvaj sciencaj kaj fakaj revuoj publikigas artikolojn ankaŭ en Esperanto aŭ donas resumojn en tiu lingvo. Granda nombro da sciencistoj, speciale en Japanujo, publikigas siajn verkojn kaj studojn en Esperanto.

Paralele kun la disvastiĝo de Esperanto kaj kun la kresko de la Esperantlingva literaturo en la plej larĝa senco de la vorto, daŭre evoluadis ankaŭ la lingvo. Sufiĉas menci ke la unua vortareto enhavis nur iom pli ol 900 radikojn (el kiuj oni povis formi ĉ. 10 000 vortojn), dum la nuntempaj ĝeneralaj vortaroj enhavas ĉ. 8000 vortradikojn, kio egalas al proksimume 80 000 vortoj. Al tiuj oni devas aldoni multajn sciencajn, teknikajn kaj fakajn esprimojn, entenitajn en la 112 fakaj vortaroj kaj terminaroj, ĝis nun publikigitaj en la Internacia Lingvo. El genia projekto la Internacia Lingvo transformiĝis en nuanco-plenan instrumenton de pensado kaj komunikado. Ĝi fariĝis vivanta lingvo, kun tute propra spirito, de vivanta internacia kolektivo. Tio estas senduba fakto.

Antaŭ Zamenhof multaj – inter ili kelkaj veraj gigantoj de la homa penso – serĉis konvent solvon de la lingva ĥaoso. Post Zamenhof pluraj aliaj klopodis – ĉu pro persona gloremo, ĉu pro neslo aŭ nekompreno de la problemo – ankoraŭfoje malkovri jam malkovritan Amerikon. Kelkfoje tiuj provoj elvokis iom da interesiĝo en la gazetaro kaj per tio kreis iom da konfuzo en la neinformitaj medioj. Plej ofte ili restis seneĥaj. Nenio el ili sukcesis firmiĝi. Nenio transpasis la limojn de teorie pli aŭ malpli taŭge planita projekto. Neniu socie enradikiĝis. Kaj pli aŭ malpli baldaŭ ili malaperis unu post la alia en la mallumo de la forgeso.

Kial, do, Esperanto sukcesis, dum ĉiuj aliaj projektoj de komuna lingvo, kvankam kelkfoje apogataj de famaj nomoj, fiaskis? La kaŭzoj estas pluraj, sed tri el ili ŝajnas esti esencaj:

1. Zamenhof bone komprenis, ke lingvo internacia devas konsisti el elementoj maksimume internaciaj. Tial li notis en ĝian vortaron radikojn jam internaciigintajn kaj signis la vojn de plua riĉigo de la lingvo per novaj internaciaj esprimoj. Sed li ankaŭ komprenis, ke lingvo ne konsistas nur el vortoj: plue, ke, unuflanke, ne ekzistas absoluta internacieco de la vortoj – nek laŭhave, nek laŭforme – kaj ke, aliflanke, por atingi facilecon estas necese ordigi kaj sistemigi tiun internacian lingvomaterialon kaj liberigi ĝin de balastaj akcesoraĵoj kaj absurdaĵoj. Tial, ekzemple, Esperanto havas fonetikan ortografion. Tial en ĝi ĉiu elemento ricevis difinitan signifon kaj la tuta lingvo aglutinin karakteron kun plej simpla gramatika strukturo. Per la sistemo de afiksoj la Internacia Lingvo akiris vastajn eblecojn de subtila derivado, tiel ke ĝi estas multrilate konsiderinde pli riĉa en nuancoj ol la naciaj lingvoj. Pro la karaktero de sia vortaro, pro la aglutina strukturo kaj la logika sistemo de derivado Esperanto posedas la plej altan gradon de vera kaj reala internacieco: ne, kompreneble, el vidpunkto de difinita grupeto da nacioj kaj de iliaj intelektaj satelitoj, sed el vidpunkto monda. Esperanto estas same proksima al la popoloj de Eŭropo, kiel al tiuj de Azio aŭ de la aliaj kontinentoj. Samtempe tiuj karakterizoj treege helpas la rapidan ellernon de la lingvo kaj ebligas ĝian tujan praktikan uzon skribe, lege kaj parole ne nur fare de kleruloj, sed ankaŭ fare de la plej ordinaraj homoj.

La moto „Por ke lingvo estu tutmonda, ne sufiĉas ĝin nomi tia“, presita sur kovrilpaĝo de la unua lernolibro, entenas fundamentan principon de unuaranga graveco.

2. Lingvo estas socia fenomeno. Por ke ĝi povu meriti la nomon de lingvo, ĝi devas kontentigi ĉiujn bezonojn de pensprimado de difinita homgrupo. Tio signifas, ke ĝi ne povas esti limigita nur al science aŭ nur al kiu ajn alia speciala fako, sed ĝi devas rilati al ĉiuj homaj aktivech. Tio plu signifas, ke ĝi povas esti evoluigata ne de tiu aŭ alia unuopulo, - eĉ ne de la plej genia – sed nur de la tuta homgrupo, kies spirita proprieto ĝi estas, surbaze de ĝiaj efektivaj bezonoj. Ankaŭ tiun grandan veron Zamenhof bone komprenis. Li tuj „forcedis ĉiujn personajn rajtojn“ je la lingvo kaj akcento deklaris jam en la unua lernolibro: „Internacia Lingvo, simile al ĉiu nacia, estas proprajo socia“. Precize tia ĝi estis kaj estas konsiderata kaj sentata de tiu internacia kolektivo, kiu ĝin akceptis por utiliti ĝin en siaj reciprokaj internaciaj rilatoj.

3. Sendube, la lingvaj malfacilaĵoj troviĝas en la radikuj mem de la ideo de komuna supernacia lingvo. Sed tiuj malfacilaĵoj fariĝas objektivaj obstakloj kaj sentiĝas kiel tiaj nur tiam kaj ĝuste tial, kiam kaj ĉar oni ekkonceptas la homaron kiel principe unuecan kaj la mondon kiel principe tutecan super ĉiuj diferencoj rasaj, naciaj, religiaj, sociaj kaj aliaj. Animo delikata kiel tiu de Zamenhof ne povis ne eksenti tion, despli ke li naskiĝis, edukiĝis kaj vivis en medio plurnacia, saturita de reciproka intergenta malamo. Tute nature, do, li enspiris en la lingvon spiriton de profunda humaneco. Ankaŭ tiurilate lia subjektiva penso harmonie akordis kun la objektivaj formiĝantaj kondiĉoj.

La proporcie balancita kombino de la tri tuŝitaj elementoj kaŭzis la plenan sukceson de Esperanto el lingvistika vidpunkto. Ili estas garantio por la pua disvastiĝo kaj paralela evoluo de la Internacia Lingvo, por ĝia ĉiam pli ampleksa aplikado en la internaciaj rilatoj. La pli aŭ malpli rapida progresado de Esperanto en la estonteco dependas ne de la ecoj de la lingvo mem – ecoj, kiuj en la 70-jara funkciado montriĝis absolute konformuj al la bezonoj – sed de la rapideco, laŭ liu la hodiaŭa mondo iros al sia pli granda integriĝo. Ĉar unu afero estas certa kaj senduba: integriĝo en iu supera tuto, sed tiel ke samtempe estu konservitaj la individuecoj de ĉiuj nacioj, de la naciaj kulturaj valoroj kaj de ilia plej granda valoro – la nacia lingvo -, ne estas imagebla sen komuna lingvo vere internacia kaj laŭ sia strukturo, kaj laŭ la celo kaj apliko, kaj laŭ sia socia portanto.

ESPERANTISTA KLUBO en PRAH kunvenas ĉiumerkrede en Praha 2, Ve Smečkách 26 je la 20-a horo. Dum someraj monatoj (julio-aŭgusto) la klubaj vesperoj entenas aktualaĵojn, programerojn de eksterlandaj gastoj, konversacion, kantojn, tradukojn, legadon el interesaj libroj ktp. Ĉiuj vizitantoj rajtas plene kontribuci la programon post sia antaŭa anonco al la vespergvidanto.

NIAJ MEMBROJ KAJ AMIKOJ.

PROMOCIOJ:

La 28-an de junio 1957 en la aulo de SVŠT en Bratislava estis promociita je ĥemia inĝeniero Milan L. Zvara el Poprad.

La 2-an de julio en Karolinum en Praha estis promociita Anička Mrázová – Veselá el Rokycany.

La 3-an de julio en Karolinum en Praha estis promociita Zdeněk Čapek.

Ĉiuj tri eminentaj junaj esperantistoj, gravaj junularaj laborantoj akceptu nian sinceran gratulon!

MORTO:

Vendrede estis kremaciita Václav Král el Praha. Fidela klubano, longjara kluba komitatano, komitatano de estinta EAĈSR, Ĉe-instruisto-instruisto de Andreo Czech en Arnhem, esperantisto de junaĝo, mortis kaŭze de danĝera malsano en sia 56-a jaro. Antaŭ la dua mondmilito li estis unu el gvidantaj esperantistoj de meza Sudslovakio, kie li en Rimavská Sobota ĝis la jaro 1938 deĵoris. En Praha post sia transloĝiĝo li daŭrigis sian poresperantan laboron, gvidis kursojn, studrondojn, kontribuis diversajn klubajn programojn, dediĉis sin al eksterlandaj vizitantoj, fervore vizitadis la Klubon ĝis lasta monato de sia vivo. Homo de tre bona koro, esperantisto en plej nobla senco de la vorto nin forlasis. Super la ĉerko dum la funebra ceremonio adiaŭis lin prez.de TKKE Josef Vítek. Multaj gesamideanoj liberiĝis de sia taglaboro por esprimi sian estron al la mortinto dum la lastaj momentoj. Unu monaton antaŭ sia morto amiko Král esprimis sian gravan deziron:

„Mi baldaŭ foriros, sed vi gardu, ke nia movado estu movado de noblaj homoj kun plej noblaj animoj, kiuj dissemos nur pacon kaj harmonion. Pri tio mi vin petas“ – kaj mi promesas al Vi, kara Král, ke Viaj vortoj nin gvidos por estonto! Ripozu en paco! La edzino kaj ceteraj parencoj akceptu nian plej profundan kunsenton.

PROMESAJ EFEKTIVIĜAS

ĈU VI JAM MENDIS?

APERIS JAM:

KOLEKTO DE 12 FOTOBILDKARTOJ EL ĈEĤOSLOVAKIO (Kčs 13)

Julie Šupichová: UNUA LEGAĴO (Kčs 5,50)

BELEGAJ GLUMARKOJ: 70 JAROJ DE INTERNACIA LINGVO

30 JAROJ DE INTERNACIA LINGVO ESPERANTO-MUZEO VIENO (prezo ankoraŭ ne fiksita)

MENDOJ PRIZORGAS:
(post ricevo de koncerna monsumo)

Jaroslav Šustr, Dlouhá 10, PRAHA I
František Pytloun, Jungmannova 29/1, PODĚBRADY.

NI RECENZAS, KOMENTAS, LEGIS POR VI....

Daŭrigon el la LETERO DE MARIE GINZOVÁ ni alportos en venonta numero.

AŬTOMOBILA KONKURSO pri rapideco kaj ŝofor-lerteco (500 km). Aranĝis Svazarm Praha nokte 18-19-an de majo 1957. Venkis Jaroslav Šustr, filo de la prez. de EK Praha, en aŭto „Wartburg“ ornamita por Esp-a stelo. La venkinto ricevis oran medalon.

--

RADIO ROMA (Ondolongoj 30,90m; 41,24m; 50,34m) servas al tutmondaj esperantistoj per altvaloraj programoj ĉiun mardon, merkredon kaj vendredon je la 18,55 ĝis 19,10 horo MET. Same regulajn programojn alportas RADIO-ZAGREB kaj RADIO-SOFIA.

--

„VERDA VOJO“ en hungarlanda Miskolc aperigis tri propagandajn poŝtkartojn kun porpaca teksto en la hungara kaj Esp.lingvoj. – Multaj gesamideanoj en Ĉeĥoslovakio havis la ĝojon el ricevitaĵaj jubileaj poŝtmarkoj, kiujn eldonis hungara poŝtministerio kun koperto de Unua tago kaj koncerna esp.teksto. Ni sincere gratulas kaj vere envias!

--

AVINETO de Božena Němcová en japana lingvo. Ni raportis jam pri tiu ĉi emitenta faro de japana samideano Kei Kurisu. Aldone ni sciigas, ke kunhelpis ĉeĥa filologo s-ano Ivan Krouský, kiu flue regas la japanan lingvon. En la libro estas esprimitaj dankoj al tiu ĉi kunhelpanto, nia samideano. S-ano Kei Kurisu nun preparas libron en japana lingvo pri la vivo de Zamenhof.

--

POLLANDO en esp. eldono. Post senlimaj traktadoj kun la ĉs. agentejo Orbis ni ricevados regule en la dua jaruono tiun ĉi luksan polan revuon. Abonis ĝin kelkcentoj da ĉs. samideanoj. Ni atentigas, ke ĵus Orbis dissendas la cirkuleron, kiun ĉiu interesulo ĝustatempe resetu (limdato fino de aŭgusto) por garantii al si la regulan ricevadon ankaŭ en la venonta jaro 1958! Krome ni atentigas niajn legantojn pri trivoluma luksa grandverko FARAONO, kiu laŭ jam anoncita prezo estas ricevebla de Jaroslav Šustr, Dlouhá 10, Praha I.

--

ESPERANTISTA KLUBO EN HRADEC KRÁLOVÉ aranĝos ek de septembro grandan eskpozicion de modernaj esperantaĵoj. Ĉiu, kiu povas, helpu al vera sukceso por prunta alsendo de valora materialo al Zdeněk Hršel, Na Špici 103, Hradec Králové II.

--

INTERNACIA FOIRO DE MARSEILLE (Internacia Merkato de la Mediteranea Regiono) belega plurlokala faldprospekto kun amonita teksto en Esperanto. Ricevebla de Internacia Foiro de Marseille, 36, La Canebière, MARSEILLE, Francujo.

--

MOSKVA-RADIO en ESPERANTO: la 26-an de marto je la 4,45 horo s-ano Závodný aŭskultis el Moskvo en anglalingva programo por Norda Ameriko informojn pri instruado de Esperanto en Sovetio kaj pri interamikiĝo pere de Esperanto kun eksterlandanoj. En la programo soveta esperantisto en Esperanto invitis fremdlandajn aŭskultantojn (esperantistojn) viziti la Festivalon en Moskvo.

Anstataŭ unuopa korespondado pri „LETEROJ EL PRAHA“:

Ĉiun unuopan abono

kun dank'akceptante mi jesas,

sed por komenci la eldonon

aliĝataj torentoj necesas.

Precipe bonvenataj okcidenteŭropaj kaj malproksimorientaj aliĝoj. El postulanta komencnombro de 3000 interesuloj pli ol 2000 jam registritaj. Represo petata!

Joĵko Staněk, ĵurnalisto, Osadní 45, Praha 7 – Holešovice, Ĉeĥoslovakio.

--

LIDOVÁ DEMOKRACIE, organo de ĉs. katolika partio, menciis la 25-an de junio, ke la 43-a UK okazos venontjare en Mainz, do jam por kvina fojo sur germana teritorio.

stk.

--

POEMOJ kaj nia BULTENO. De pluraj gesamideanoj enlandaj kaj eksterlandaj ni ricevis diverstemajn poemojn. Kvankam nia Bulteno ĉefe estas informa, ni klopodos laŭ niaj eblecoj envicigi ankaŭ tiujn ĉi kontribuaĵojn. La aŭtoroj bv. pacienciĝi. Same pro ranzonita taksta ebleco en tiu ĉi numero ne aperos pluraj informaj kontribuaĵoj de niaj korespondantoj. Ni esperas ilin publikigi en septembra eldono de Bulteno, por kiu ferma akceptado estas la 20.8.1957.

--

ANTAŬ LA LIBERTEMPO vi povas ankoraŭ mendi la Internacian Pedagogian Revuon, kiu aperas monate kaj kostas Kčs 10 por la tuta jaro. Ĝi enhavas interesajn kaj utilajn artikolojn por Esp. instruistoj kaj por ĉiu, kiu gvidas aŭ gvidos E-kurson. Mendu ĝin postulante poŝtpagilon ĉe la ĉs. peranto Th. Kilian, Příkladní 318, Třebíč.

--

SOMERA KOLEGIO EN DOKSY nunjare havos ĉ.150 frekventantoj, kiuj aliĝis el tuta respubliko.. Ĝi promesas esti vera ĉs. Esperantujo. Same anoncas SOMERA ESPERANTO-TENDARO en Popolná, kiu pro teknikaj kaŭzoj devis rifuzi pluraj dekojn da interesuloj, rekomendace al ili, aliĝon al ceteraj someraj entreprenoj. Somera Esperanto-Tendaro en KONĚŠÍN anoncas ankoraŭ kelkajn liberajn lokojn, same ankaŭ PŘÍBOR. Interesuloj, anoncu vin aŭ al Esperanto-Rondo, Dům osvěty, Třebíč (por Koněšín) aŭ al Ant. Satték, Dvořákova 744, Příbor.

--

TRI GRAVAJ RENKONTIĜOJ DE ESPERANTISTOJ: Seminario en Třinec – 70 personoj el Moravio, Bohemi, Slovakio kaj 7 gastoj el Pollando. Tradicia rendevuo sur la monto Ĉantoria estis vere ĉs.-pola. Krom multaj ĉs. esperantistoj venis polaj gastoj el Katowice, Cieszyn, Opolie, Chorzow, Bielsko, Krakow, Wroclaw, Warszawa. Ĉiuj vortoj esprimis sinceran deziron pri frateca kunlaboro. – Saman triton portis la laborkunveno en sudmoravia Znojmo-Jevišovice, kie kolektiĝis 70 diverslokaj esperantistoj, krom du neesperantistaj karavanoj. La malnova kastelo estiĝis muta atestanto de fruktodonaj traktadoj kaj raportoj kaj de promesplenaj eblecoj de revivigo de nia movado en tiu ĉi parto de nia ŝtato. – La tria: renkontiĝo de Esperantista junularo en Poděbrady – 32 partoprenantoj el 15 lokoj de orienta Bohemio. Diskutoj klarigis diversajn problemojn de nia movado kaj firmigis la laborvolon de multaj por la aŭtunvintra sezono. – Třinec-Ĉantoria okazis 15-16an de junio, Znojmo-Jevišovice la saman daton kaj Poděbrady la 30-an de junio. Ni ege bedaŭras ne povante aperigi pli informajn raportojn, kiujn ni ĝustatempe ricevis de niaj sinoferaj kunlaborantoj.

--

42-a UK en MARSEILLE kaj ĉs. reprezentantoj. Kvankam la traktadoj pri elsendo de niaj delegitoj daŭras kaj ni ricevis de la oficiala flanko certajn promesojn, ni ankoraŭ ne povas certigi partoprenon Ni firme esperas.

--

POR DIVERSSPECA PERIGA SERVO oferas sin Mag.phil.M.ZGÓRZEWSKI, WROCLAW 2, skrytka pocztowa 22, Pollando-literaturisto, publicisto. Demandante aldonu 2rkp.

--

Vietnamia revuo TÔ QUÔC, nro 57 1957 sur la pĝ 26-27 aperigas en vietnama lingvo informan artikolon de Hoàng Minh Gián „Zamenhof kaj Esperanto“.

--

Asocio de literaturistoj kaj Asocio de Esperantistoj en Pollando, filioj en Gdańsk organizis la 14-an de junio LITERATURAn VESPEROn honore al Antonio GRABOWSKI.

--

ĈS. OFICIALA ESP. DELEGITO POR LA FESTIVALO EN MOSKVO: k-do Miloslav Jíra el Jablonec n. Nisou estis oficiale probita per ČSM (Ĉs. Junular-organizo) kiel reprezentanto de ĉs. junularo por la renkontiĝo de junaj esperantistoj dum la Festivalo. Ni estas ankaŭ informitaj, ke pluraj elektitaj delegitoj studis en rapidkursoj Esperanton por la renkontiĝo.

--

GRAVAJ SCIIGOJ: pluraj korespondantoj sendas al ni gravajn sciigojn pri okazintaĵoj en siaj landoj, dezirante la publikigon. Ni substrekas: ni povas publikigi nur telegrafstilajn raportojn, kiuj koncernas la movadon kaj porpacan laboron de esperantistoj. Por alispecaj informoj ne estas loko en nia Bulteno, kiun ni eldonas en nepligrandigebla kvanto nur pere de kromlaboro de la redaktoro. Pli ol

600 ekz. de ĉiu numero ni sendas al niaj nepagipovaj s-anoj en div.landoj. Tion ebligas la donacoj de nialandaj oferemaj ges-anoj, kiel vi povas legi sur la lasta paĝo. Multaj el la legantoj deziras de ni ankaŭ ne-aŭ malfacile plenumblajn taskojn, forgesante, ke ni estas nek oficejo, nek kancelario, sed normale alispece okupitaj homoj, kiuj surprenis la esp.taskojn libervole kiel kromlaboron por servi al la paco kaj disvastigo de Esperanto. Tial ne miskomprenu nian bonan volon, sed bone pritaksu niajn eblecojn.

TKKE-komitato, redakcio de Bulteno, EK-komitato

KORESPONDI DEZIRAS:

Rimarko: ni uzas ĝeneralajn mallongigojn por ŝpari la spací. La anoncanto havas sian moralan devon almenaŭ unufoje respondi la proponon!

BULGARIO:

F-ino Julija STAEVSKA, Gabrovo 20, SOFIA; kun gejunuloj PI, L.

F-ino Gnka Marinova, BARDAROVA, okrag Rusenski, okolie Belenska, v.Dve mogili; 17-jara stud. PI kĉl.

K-do Blagoj PAVLOV, komuna loĝejo „Hristo Botev“, stacidomo SOFIA; kĉl.

F-ino Vasilka PETROVA, Balkan 10, SOFIA; kun gejunuloj PI, L.

S-ano Ivan I. ĜUTEV, str. Gavril Genov 10 VARNA; kĉl. L, PI, revuoj.

K-do Dejan KRUMOV, Mihajlovo, SOFIA; 30-jara kĉl. L, PI.

ĈEĤOSLOVAKIO:

S-ano Evžen ZÁMEK, VELKÝ BERANOV 2 u Jihlavy; gramofondiskojn PM kĉl.

K-do Petr PŘIBYL, Korunní 12, OSTRAVA III; L, PI kĉl.

K-dino Růžena MAREŠOVÁ (instruistino), ŽAMBERK 642; kĉl. muziko, PI, gazetou

S-ano Jaroslav ZEMEK (poŝtoficisto), PRACHOVICE, okr. Chrudim; PM kompl. seriojn aŭ po 50 pecoj kĉl.

Johakin-Eli PTOK (s-ano), MIREŠICE 2 u Třebonic; kun fraŭlino 20-26 jara el Praha aŭ ĝia ĉirkaŭaĵo

S-ano Břetislav HOUŽVIC, ul. 5. května 11, DOKSY u Mách.jez.; kĉl. PI, L.

S-ano Zdeněk ŠAAR, ul. 5. května 37, DOKSY u Mách.jez.; kĉl. PI, L.

S-ano MVDr. Vratislav PEJŠEK, SKALSKO, okr. Doksy; kun bestkuracistoj kĉl.

S-anino Ada JAKLOVÁ, Wanklova 9, Brno; PM kĉl, L, PI.

K-dino Lída ČERMÁKOVÁ, Mojmírova 5, OSTRAVA-MARIÁNSKÉ HORY; L, PI kĉl.

S-ino M. Rohlíková, Kyjská 398, PRAHA-HLOUBĚTÍN; PI, L, kĉl.

S-ano Jiří VODIČKA, studento, Smetanova 14, JABLONEC NAD NISOU; kulturo, turistprospektoj, esp.gazetoj kĉl.

S-ano Karel KARPECKI, NÁVŠÍ 228, okr. Český Těšín; 19-j.stud.L.PI kĉl.

S-ano František BUČEK, Lihovar 169, OSTRAVA-SVINOV; 17-j.kĉl.PI.

S-ano Jaroslav ZEMAN, ul. 5. května 37, DOKSY u Mách.jez.; kĉl. PI, L.

S-ano Jan HADINEC, ul. 28. října 70, DOKSY u Mách.jez.; kĉl. PI, L.

UŠMH-Esperanto, Lázeňská 479, SADSKÁ; 16 metilernantoj – PI, PM kĉl.

ĈINIO:

S-ano Zhu Shikyan, Unua Gimnazio, BENFU, Angui-Provinco; PM, PI kĉl.

HUNGARUJO:

K-do László PFISZTNER, BERKESD 47; esp. kaj germ. pri ĉ.temoj kĉl.

K-do Antal BISCHOF, Szécsény-tér 11, PÉCS; pri akt. temoj, PM kĉl.

POLLANDO:

K-do Mgr. fil. Mięcisłavo ZGORZEWSKI, Skrytka pocztowa 22, WROCLAW-2, literaturisto, rerkisto, ĵurnalisto kĉl. PI, L. – kun samprofesianoj

S-ano Stanisław TRAJDOS, Zamenhofa 16 n. 7, LÓDŹ I; pri ĉ. temoj (krom muziko kaj sporto) kĉl. L, PI

S-ano WALCZAK Ryszard, PSM DZIERŻAŻNO, p. Kartuzy, woj. Gdańsk; kĉl. 17-j.PI, L

S-ano NIEMYT Andreas, PSM DZIERŻAŻNO, p. Kartuzy, woj. Gdańsk; 19-j. PI, L.kĉl.
S-ano KUTYSZ Janusz, Lakowa 62-3, GDAŃSK; 20-j.kĉl.PI, L.
S-ano LIPKO Juliusz, Arkońska 1/16, Szczecin; kĉl. PI, L.
S-ano SKOCZEK Wladyslaw, Osiedle „Przyjażu“ Blok 81, WARSZAWA 35; PI kĉl.
F-ino CWALIBOGOWSKA Ewa, Rekowska 3/5, KRAKÓW; 21-j.kĉl.PI, L.
S-ano RAMS Stanislaw, Niepodleglosci 25, ZIELONA GÓRA; kun juna ĵurnalisto
F-ino SNIGURSKA Halina, Miechowicka 5, CHONÓW II, woj. Katowickie; 22-j. kĉl.
S-ano REZNER Jan, ul. Powst.śl. 2/III, pow.Nysa, poczta GLUCHOLAZY; pri ekonomio, jun.movado,
histo., lingv., kino, gaz. kun gejun. PI, L.kĉl.
F-ino POPIELAK Wanda, BOCHNIA, str. Krzeczawska nr. 35; 13-j.L, PI k samaĝ.
F-ino Barbara BUJNOWSKA, ul. Komuny Paryskiej 49/11, WROCLAW; 17-j.stud.; pri filmo, libroj, muz.,
kantoj, kutimoj, naturo, historio, PI, L. prefere k. ĈSR
S-ano CZERWONKA Stanislav, PSM, DZIERŻAŻNO, p. Kartusy, woj. Gdańsk; kĉl. PI, L-
S-ano Marian SUSKI, Al. Zwycestwa 192, GDYNIA 10; 20-j. kĉl. PI, L.-
S-ano MORACZESKI Wojciech, Francuzka 22-10, WARSZAWA 33; kĉl. PI, L.-
S-ano Prokop RYSZARD, Hibnera 1, c, DS 4, GDAŃSK-WRZESZCZ; 19-j.kĉl.PI, L.-
S-ano FORNAKZYK Marian, Reja 56, WROCLAW 2; 17-j.kĉl.PI, L.-
F-ino PADUCH Irena, Nowa 4, MIKOTÓW, woj. Katowickie; 18-j.kĉl.PI, L.-
S-ano GROLEWSKI Adam, ul. Francuska 14/5, KATOWICE; 16-j. PI, rev., libr., kĉl.-
S-ano Andrzej ORAMUS, ul. Zwierzyniecka 17/26 KRAKÓW 2; pri arto, teatro, filmo, sporto, il.revuojn,
melodiojn, notojn, Intel.kĉl.-
S-ino Barbara SACHOWIAKOWA, ul. św.Michała nr. 39a/41a m.37/bl.II/POZNAŃ; 42-j. oficistino k. ĉs.
esperantistinoj pri ĉio bona, kio ligas homojn.-

SOVETUNIO:

K-dino Valeria OVETKOVA, Ĉkalovskij 60-91, LENINGRAD P-137; 20-j. instruistino kĉl. spec.k. Albanio.-
K-dino Da-Deš Bela, ulice Ljenina 7, kv. 13 KOSTROMA; k. gejun. pri pacaferoj k. diversaj temoj.-
ESPERANTO-rondeto, Institut Tekstilny, Donskoj pr. MOSKVA; kĉl. PI, L.-
S-ano T.ARBBERGS, Lenina iela 338-7a, RIGA 37, Latvia SSR; tramisto k.samprof.
K-do Vilnis SELLER, Ĉiekurkalnā I.g.lĉn.31-16 RIGA, Latvia, SSR; 25-j. stud.liter. PI kĉl.-
K-dino Maire MORGEN, Eesti NSV, Nisu 14-6, TALINN, Estonia SSR, 17-j.stud.kĉl.-
K-dino Helle LEPIKSOO, Manniku tee 79a TALINN-Nomme, Estonia SSR; 15j.kĉl.
K-do E.P.INSAROV, Puškinskaja ul.d.n. 39 KAŜIRA, Moskovska obl.; inĝ.kĉl.-
K-dino Veneta NEJKOVSKA, Puškinskaja ul.d.n.39, KAŜIRA, Moskovska obl.; instruistino pri ĉ.temoj.
kĉl.-
K-do S:KORŹAVÍN, Puškinskaja ul.d.n. 39, KAŜIRA, Moskovska obl.; librotenisto kĉl. pri div.temoj.-
K-dino Vera JASTREBOVA, Puškinskaja ul.d.n. 39, KAŜIRA, Moskovska obl.; instruistino kĉl.PI, L.pri
div.temoj.
K-do Rudolf DELMAN, Kovalĉinskaja 16, kv.I. GORKIJ 6; k. gestud.pri vivo kaj moroj, PI.L.kĉl.
K-do Viktor Nikolao GORNOV, Arzamasskoje ŝosse 2 kv. 48, GORKIJ; sporto.-
K-do Teodor LJAŜEVIĈ, p/o Siverskaja, poste restante, Gatšinskij rajon, Leningradskaja oblast;
instar.kĉl.PI, L.-
ESPERANTO-grupo, Institut Zvetnik Metalov, Krimski val 3, MOSKVA; kĉl pri renkontiĝo dum la
Festivalo.-
K-do Herman KRUGLOV, Viestura pr. 5, N 2, dz. 6 RIGA, Latvia, SSR; kĉl.PI, L.-
K-do Georgo MAVRIN, Pedagogia instituto ĉambro 14, JAROSLAVLO; 18-j. pri liter., PM kĉl.-

Gosudarstvennij universitet imeni Lobačevskogo, Fiziko-matematikčeskij fakultet, V. Beškarev, ul. Sverdlova 37 GORKIJ; gestud. de fizikmatemat.fakult. kun gejun.kĉl.-

Ŝkola Ŝuhamjan, Prospekt Stalina 63, BREVAN, Armenia SSR; infanoj 14-16 j. kun samaĝaj esp. ĉl. Pl.-
K-dino Galina KOZLJONKOVA, Puŝkinskaja ul. d. n. 39, KAŜIRA, Moskovska obl.; skribistino pri ĉ.temoj kĉl.-

K-do Jurij KUTUZOV, Puŝkinskaja ul. d. n. 39, KAŜIRA, Moskovska obl.; instruisto kĉl. Pl, L.-

K-do Leonid KAPUSTIN, P/K 110, „ESPERANTO“, GORKIJ-7; gvidas Korespondservon kaj atendas por tiu celo proponojn el ĉiuj landoj. Kolektas nacilingvajn E-ŝlosilojn, rekompencas por rusaj. Laŭ dezirata kvanto, sed ne malpli ol du ekz-ojn.-

VIETNAMIO:

1. Esperanto-LIEN-HIEP THAN-NIEN VIETNAM, HANOI. Gejunuloj partoprenontoj al la Via Festivalo deziras korespondi kun ĉiuj landoj.
2. Esperanto-sekcio BAO TIEN-PHONG HANOI. Junulara gazeto publikigos senpage adresojn de ĉiuj gejunuloj, kiuj deziras kor.kun Vietnamio, kolektas foton de E-kursoj kaj junulaj kunvenoj preparantaj sin al Festivalo.
3. Esperanto-sekcio BAO SINH-VIEN, KHU HOC XA HANOI, studentara gazeto publikigos senpage korespondanoncesojn de gestudentoj el ĉiuj landoj.
4. Esperanto-rondo VÃN CÕNG TÕNG CUC GHINH TRI HANOI, popolarnea artisma kolektivo partoprenonta al Festivalo deziras korespondi individue kaj kolektive kĉl. precipe kun Sovetunio, Ĉinio, Koreio kaj interŝanĝas popolkantojn, muzikaĵojn, dancojn, ktp.
5. Esperanto-fako NHA XUÃT BAN NGOAI VAN BÕ VÃN HÕA HANOI, gazet- kaj libroeldonejo sendas vietnamajn, anglajn, francajn ilustritajn gaz., librou pri Vietnamio kontraŭ esperantaj gazetoj kaj libroj. ELDONOS ESPERANTAĴOJN SE ESTOS MULTAJ PETOJ EL DIVERSAJ LANDOJ. SKRIBU AMASE!!
6. Efika propagandilo – Vietnama memlernolibro de Esperanto de k-doj N. H. TRUNG kaj DAO ANH KHA, 80 pĝ, 18x24, dukolora kovrilo, bele presita (gramatiko, vortareto, naŭlanda adresaro) kun portreto de Zamenhof kaj faksimilo de aŭtografo de Prezidanto Mao-Ce-Tung rekomendinta la E-lernadon, estos sendata kontraŭ 8 int.resp.kup.aŭ samvaloraj esp-aĵoj. Skribu al Vietnamia Pacdefenda Esperanto-Asocio, Bao Nhã dãn, HANOI.
7. S-ano Nguyen van Huyẽn Bõ Giao due HANOI, pedagogiko dez.kor.kun samprofesianoj el ĉl. pri instar.mez. kaj altgrada.
8. S-ano Hoang minh Giam Bo Van hoa HANOI, kulturlaboranto dez.kor. pri kulturo, liter., organizo de kulturdomoj, interŝanĝas anglajn, franc. literaturaĵojn kĉl.
9. K-do TRÃN VÃN GIAU Daihoc HANOI, profesoro pri historio kun samfakuloj.

DONACOJ POR SUBTENI LA ELDONADON DE NIA BULTENO:

V. Votrãb, Sedlec u Plznẽ: 4; O. Malý, Lhũta u Plznẽ: 6; Ŝt. Zãvodský, Ŝilina: 16; Dr. M. Horvãth, Ŝilina: 6; Ing. V. Jirsãk, Ŝilina: 16; M. Pijãk, Ŝilina: 16; J. Tandara, Turiec: 16; F. Liĉka, Ostrava: 10; L. Heiserovã, Havĩrov: 20; S. Samek, Trutnov: 10; E. Ŝpaĉek, Ostrava: 16, MrPh O. Hoffmann, Mikulãš: 20; B. Přeĩãš, Ŝumbark: 16; P. Zd. Bordovský, Kromẽřĩž: 20; A. Frolĩkovã, Pĩsek: 6; J. Ŝtechr, Pardubice: 10; M. Stuchlý, Gbelce: 15; J. Hiller, Bratislava: 6; A. Ŝevĉĩkovã, Uhřĩĉice: 13; Zd. Řezãĉ, Ŝumburk: 20; Fr. Hãjek, Praha: 10; V. Klimek, Malé Svatoňovice: 6; Fr. Cunderka, Gottwaldov: 10; V. Trojan, Ŝaclẽř: 26; K. Opavský, Olomouc: 20; R. Tomiczek, Karvinã: 16; V. Hejda, Nové Strašecĩ: 16; J. Křĩvohlavý, Karlovy Vary: 16; Fr. Havlĩk, Praha: 6; V. Vantuch, Ostrava: 16; Fr. Bis, Praha: 16; Fr. Pytloun, Podẽbrady: 50; J. Polãĉek, Třebĩĉ: 10; DO Strakonice: 24; J. Hopf, Nové Sedlo: 10; Kar. Ĉĩnĉera, Brno: 15; A. Geleta, Dvory n. Ŝitnou: 15; St. Chaloupka, Ostrava: 15; Fr. Madẽryĉ, Havĩrov: 20; A. Matyãškovã, Opava: 16; R. Hromada, Praha: 24; J. Holub, Tisovã: 10; ZK JITEX, Pĩsek: 50; P. Bubĩk, Stonava: 16; J. Balay, Brno: 15; J. Vraŝtilovã, Hrade Krãlové: 15; M. Hirschovã, Brno: 5; Fr. Ĉerný, Brno: 6; J. Kocianovã, Svit-Tatry: 10; Kl. Krebes, Dolnĩ Jiřetin: 10; Fr. Pecka, Jablonec nad Nisou: 6; Fr. Liĉky, Ostrava: 10; J. Ŝkorpil, Tãbor: 10; Fr. Střĩbrský, Kladno: 13; J. E. Ptok, Mireŝice: 26; L. Dandovã, Praha: 25; A. Stieblerovã, Jihlava: 10; J. Otta, N. Město n. M.: 20; J. Smolinskã, Brno: 16; Fr. Suchý, Ŝďãr n.S.: 10; R. Fukala, D. Bludovice: 6; E. Kuĉerovã, Skaĉany: 15; K. Majtner, Ostrava: 16; Dr. H. Jokl, Tãbor: 20; A. Jermãřovã, Ostrava: 20; B. Horãk, Přerov: 20; M. Hanusovã, Brno: 16; Fr. Pecka, Jablonec n.N.:20; V. Badin, Nové Zãmký: 10; O. Baran, Ŝvãbolka: 18, 70; O. Svoboda, Brno: 20; R. Hirner, Bratislava: 20; Fr. Lachnit, Svinov: 10; M. Langpaul, Dolnĩ Krupã: 15; A. Rinkovã, Levoĉa: 15; J. Ponĉa, Orlovã-Lazy: 25; J. Kolek, Ostrava: 14; Zd. Bednãř, Javornice: 20; V. Broŝĩk, Brandýs n.Lab.: 25 (por eksterl.amikoj). AL VI ĈIUJ SINCERAN DANKON!

BULTENO, informilo de Esperantista Klubo ĉe OB2 en Praha; aperas laŭbezone.

Respondeca redaktoro: Josef Vítek, Jungmannova 24, PRAHA II., tel. 238323.

Prezidanto de la Klubo: Jaroslav Šustr, Dlouhá 10, PRAHA I., tel 63464.